# Vi en la biblio

## HIMNO DE FÁTIMA – AVE MARIA




*Verku mem pliajn strofojn el la biblio, ekzemple:*

4. Vi petis Jesuon pri l' signo de vin'.
   La sangon, la akvon vi vidis je l' fin'.

5. Virino humila, sklavino de Di',
   la dirojn de l' sav' vi pripensis en vi.

6. Subkruce vi staris sen ajna honor',
   kaj vian animon trapasis dolor'.

HIMNO DE FÁTIMA – AVE MARIA • M: anonima, frua 20a jarcento • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2017-12-02

*Mi skribis ĉi kanton kiel reagon kontraŭ Espero Katolika 4-6/2017, ĉefe kontraŭ la fuŝa kanto sur paĝo 26: tute falsaj takto-strekoj, aldonitaj silaboj, malĝustaj tekst-akcentoj. – Domaĝe, ke oni ne povas ŝanĝi la refrenon!*

*Cetere:*

*Jan Kalný lingve bone, flue, lerte rakontas (p. 21 - 26, bedaŭrinde mankas intertitoloj). Pri la historiaj faktoj li ne kulpas. Ekzemple: La demando «kiu el ili tri atingos la ĉielon?» kaj la (laŭdita!) moro, ke 7- ĝis 10-jaruloj «portis tagnokte krudajn ŝnurojn ĉirkaŭ siaj trunkoj», teruras. Kia fia religiaĉa atmosfero! Kia deturno de vera religieco, ke 70 000 homoj sensaci-avide gapas pri miraklo!*